

& Inter du virinoj:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) ŝanĝinte lokon inter versoj de la du lastaj strofoj pro rimo.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Delogi2s tre matura damo ; mezaĝan viron, kiun amo

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.**)

'2 de junulino same ravis, ; kaj tiuj du virinoj havis

'3 tre grandan zorgon por lin ligi ; kaj ĉiel al si konformigi.

'4 La harojn ili al li flegis, ; kaj nia viro feliĉegis

'5 revivi siajn tempojn junajn. ; Nu, sed la dam' la harojn brunajn,

'6 kaj la knabin' la harojn grizajn ; elŝiris dum la flegoj frizaj,

'7 ĝis fine, ho, la aĝa knabo, ; jen estis li kun kalva kapo.)